

KI KILAKTO

numero 222 (2007:6)

ISSN 0023-3692

Literatururo



Saluton, karaj legantoj kaj amikoj de *KONTAKTO*!

Komence bonvolu ricevi miajn gratulojn okaze de ĉiuj jarŝanĝaj festoj kaj la pardonon pro tio, ke ili (kune kun tiu ĉi *KONTAKTO*-numero) venas al vi kun denova malfruo. La situacio certe estos riparita, sed tio nelaste dependas ankaŭ de via aktiveco. Verku mem por la revuo kaj verkigu viajn amikojn kaj konatojn – ni kune faru la revuon pli interesa!

Tiu ĉi numero estas dediĉita al literaturo. En ĝi vi legos kaj pri la Esperanta literaturo (i.a., la intervjuon kun J. Camacho pri la Beletra Almanako kaj iom pri la Esperanta literaturo ĝenerale), kaj pri la literaturo nacilingva. Interalie vi povos ekscii pri la armena literaturo de la komenco de la 20-a jarcento, pri la fama pola sciencfikciisto A. Sapkowski, pri la plej elstara tataro poeto M. Ĝalil, pri la angla poeto kaj pentristo W. Blake, pri la italo G. Ungaretti kaj liaj poeziaj kreaĵoj. Krome, atendas vin du bildstrioj kaj kelkaj pliaj malgrandaj, i.a., ĉarma facillingva teksto pri sveda verkistino A. Lindgren.

Fine mi deziras al vi agrablan legadon de *KONTAKTO* – ankaŭ en la jaro 2008!

Paŭlo

Temoj de la venontaj numeroj de *KONTAKTO*

Numero 223 (2008:1). La ĉef-temo – "Neordinaraj hobiaj"

Numero 224 (2008:2). La ĉef-temo – "Teknologioj kaj scienco"

(la limdato – la 1a de aprilo)

Numero 225 (2008:3). La ĉef-temo – "Edukado tra la mondo"

(la limdato – la 1a de junio)

Ĉiuj viaj artikoloj (ajnatemaj) kaj proponoj estas bonvenaj kaj tre bezonataj!

Kiel sendi kontribuojn al *KONTAKTO*?

- ✓ sendu prefere tekston originale verkitan en Esperanto aŭ foton/bildon memfaritan
- ✓ se vi sendas tradukon, bv. indiki la originajn fontojn, lingvon kaj aŭtoron. Ĉe fabelo indiku, ĉu ĝi estas popola (kaj de kiu popolo) aŭ verkita de vi
- ✓ *KONTAKTO* ne estas movada revuo, do *ne sendu al ĝi primovadajn raportojn!*
- ✓ indiku, ĉu via artikolo jam aperis, aŭ estas proponata al alia revuo
- ✓ fotoj devas esti bonkvalitaj, ne gravas ĉu nigrablankaj, ĉu koloraj. Ne forgesu aldoni la nomon de la artisto aŭ de la fotinto!
- ✓ dikajn kovertojn prefere sendu registritaj.
- ✓ rete bv. sendi vian artikolon kiel kutiman retmesaĝon aŭ RTF (bv. uzi x-kodon por supersignaj literoj); bildojn – kiel JPEG (150-300 dpi)
- ✓ ilustraĵoj kaj adresoj en la interreto, kiuj rilatas al via temo, estas tre bonvenaj! **Koran antaŭdankon!**

<ENHAVO>

Beletra Almanako kaj Esperanta literaturo (intervjuo kun J. Camacho)	3-4
Beowulf – esperantiginda verko! (Michael Cayley, Britio)	4
Morti kantante, vivi ridante (Yenovk Lazian, Germanio)	5-6
Novtipa literaturo: bildstria ĵurnalismo (François Parchemin, Francio)	6
Fantasta mondo de Andrzej Sapkowski (Gabriela Kosiarska, Pollando)	7
Prizonaj kajeroj (Aleksandro Galkin, Rusio/Germanio)	8
William Blake 250-jara: memor-festa omaĝo (Ralph Dumain, Usono)	9-10
Hermetismo en la itala poezio de la 20a jarcento (Nicolino Rossi, Italio)	11
Invito al "La doloro" (Anna Maria Dall'Olio, Italio)	12
Superrigado pri la meksika literaturo (Juan Jacobo Schmitter, Meksiko)	12
Projekto RoMEo: muskol-streĉe li ekflugas! (Daniele Binaghi, Italio)	13
"Lolita" de V. Nabokov – skandala kaj aktuala (Rubén Feldman-González, Meksiko/Usono)	13
Bumerange: Misprezentoj kaj prisilentoj	14
Unua libro verkita en Esperanto en Brazilo 70-jariĝas (Fabiano Henrique, Brazilo)	14
Bildstrie/Informe	15
Informe	15
Astrid Lindgren kaj la solaj knaboj	16

Forpasis Claude Piron kaj Donald Harlow

La 22-an de januaro forpasis unu el la plej elstaraj nuntempaj esperantistoj, verkisto kaj arda propagandanto de Esperanto **Claude Piron** (1931-2008). Krom esti populara verkisto, instruisto (i.a. aŭtoro de la fama lingvo-instrua verko "Gerda mala-peris!") kaj lerta defendanto de Esperanto Claude Piron estis ankaŭ granda amiko de *KONTAKTO*, al kiu li ofte kontribuis per facillingvaj artikoletoj.

La 27-an de januaro forpasis **Donald (Don) Harlow** – eminenta usona esperantisto, iama prezidanto kaj honora membro de Esperanto-USA (antaŭe ELNA). Li verkis la libron *The Esperanto Book* kaj kreis la paĝojn *Esperanto Access* kaj *Literaturo en Esperanto*. Don dividis la Premion Deguĉi de UEA en 2003 kaj ricevis Diplomon pri Elstara Agado de UEA – li estis la unua esperantisto, kiu ricevis tiun honoron.

La tuta *KONTAKTO*-teamo funebras pro tiuj ĉi forpasoj...

KONTAKTO: Dumonata socikultura revuo de **Tutmonda Esperantista Junulara Organizo** (TEJO), eldonata de **Universala Esperanto-Asocio** (UEA). **Fondita** en 1963. **N-ro 222** (2007:6), 44-a jarkolekto. **ISSN** 0023-3692. **Legata** en ĉ. 90 landoj. **TTT-paĝo**: <<http://www.tejo.org/eldonoj.jsp>>. **Eldonanto** (administrado, abononj, anoncoj): **UEA**: ✉ Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando; tel.: +31 10 436 10 44, fakso: +31 10 436 17 51; ret-adreso: <uea@inter.nl.net>. **Redakcio**: *KONTAKTO*, ul. Rabochaja 24, kv. 29, Jaito, Krimeo, UA-98612, Ukrainio; ret-adreso: <kontakto@tejo.org>. **Redaktoro**: Paŭlo Mojajev (Ukrainio). **Grafikisto/vic-redaktoro**: Eugenia (Ĵerĵa) Amis (Ukrainio/Usono). **Korektisto**: Aleksandro Galkin (Rusio/Germanio). **Presado**: Skonpres, Bydgoszcz (Pollando), ret-adreso: <skonpres@poczta.onet.pl>. **Konstantaj kunlaborantoj**: Joel Amis (Usono), Tatjana Auderskaja (Ukrainio), Daniel Richard Bebelacqua Acosta (Urugvajo), Daniele Binaghi (Italio), Olivier Gaudefroy (Francio), Etsuo Miyoshi (Japanio), Olubunmi Osho-Davies (Niĝerio), Maksim Petrov (Kazaĥio), Saliko, (Finnlando), Aneta Ubik (Germanio), Jefim Zajdman (Ukrainio). **Facillingvaj artikoloj** estas verkita en la niveloj *tre facila* kaj *facila*, laŭ la vortolisto de *KONTAKTO*. Tiu listo aperas en la unua numero ĉiujare. **Anonctarifoj**: Tutpaĝa 350 EUR, 1/2-paĝa 190 EUR, 1/4-paĝa 100 EUR, 1/8-paĝa 55 EUR, 1/16-paĝa 30 EUR. Anoncoj sur kovrilpaĝoj kostas double. Por E-organizaĵoj 50% da rabato. Varbantoj de ekstermovadaj anoncoj ricevas maklerajon de 30%. Por anoncoj bv. kontakti UEA. **Anoncetoj**: por *Anonctabulo* kostas tri internaciajn respondkuponojn por dek vortoj. Bv. sendi rekte al la redakcio aŭ al UEA. **Abontarifoj**: varias laŭlande. Petu informojn de UEA. **Malfortvidantoj**: povas ricevi voĉlegitan eldonon senpage. Sendu du 60-minutajn kasedojn al Elise LAUWEN, Fort Alexanderstraat 16, NL-5241 XG Rosmalen, Nederlando. **KONTAKTO en radioj**: Regiono / tempo (UTC) / metroj / frekvencoj (kHz): *Radio Havano (Kubo)* Okcidenta kaj Norda Ameriko kaj Pacifika Azio/ 7:00/31/9 820; Tuta Ameriko kaj Karibio / 15:00, 23:30/25/11 760; Eŭropo Mediteranea/ 19:30, 22:00/21/13 715; <<http://216.138.240.229/rc4>> (je la 15a horo UTC), <http://roi.orf.at/esperanto/es_demand.html> (laŭ mendo tra la servilo de Austria Radio Internacia). **La redakcio kaj la eldonanto ne respondecas pri la opinioj de unuopaj aŭtoroj.**

Beletra Almanako kaj Esperanta literaturo

(INTERVJUO KUN J. CAMACHO)

Antaŭ kelkaj monatoj oni anoncis la aperon de la unua Beletra Almanako. La almanako (kaj la tuta aktivaĵo malantaŭ tiu libroforma eldonaĵo) celas iom vigligi la Esperantan beletron kaj proponi plian spacon por novaj kaj malnovaj Esperantaj aŭtoroj. Ni uzis la okazon intervjui unu el la motoroj de la iniciato, Jorge Camacho, kiu dividis kelkajn siajn pensojn ankaŭ pri la Esperanta literaturo ĝenerale.

– *Malgraŭ tio, ke multaj esperantistoj jam aŭdis pri via iniciato, sur la paĝoj de KONTAKTO tiu temo ankoraŭ ne estis tuŝita. Bonvolu koncize klarigi (aŭ memori) al la legantoj, pri kio temas.*

– “Beletra Almanako” (mal-longe BA) estas nova libroforma literatura revuo. Tio signifas ke, anstataŭ aboni, oni povas aĉeti aŭ mendi ĝin kiel libron. La unua “boao” kun 176 paĝoj aperis en septembro 2007 kaj daŭre aĉetebles. BA2 aperos marte 2008, BA3 en septembro, kaj poste ni vidos, ĉu aperigi 3 numerojn jare ekde 2009. La septembra numero, havante 176 paĝojn anstataŭ la planitaj 140, dediĉas 75 el ili al la verkoj, premiitaj en la tiujaraj Belartaj Konkursoj de UEA.

– *Kiuj homoj staras malantaŭ tiu laboro?*

– Mi ekhavis la ideon kaj tuj kontaktis pri tio la eldoniston Ulrich Becker (la eldonejo “Mondial”) en Novjorko; ricevinte lian entuziasman jeson, mi varbis por la afero miajn kolegojn kaj amikojn István Ertl kaj Probal Daŝgupto, kiu tiutempe ankoraŭ ne estis la prezidanto de UEA.

– *Ĉu la reeĥo de la verkema esperantistaro estis sufiĉe laŭta? Mi celas, ĉu vi rapide trovis sufiĉe da kunlaborantoj?*

– Jes, tre rapide. Fakte nun ni havas materialon ne nur por la tuta BA2, sed ankaŭ por granda parto de BA3. Ĉiel ajn oni ne hezitu sendi al ni kontribuojn; ni provos trovi lokon por ili en la revuo.

– *Kia rezultis la unua volumo? Kiel bunta ĝi estas (stile, geografie, nivele) kaj kion ĝi fakte enhavas?*

– Ni ĉiuj tre kontentas pri la rezulto kaj ĝenerale ricevis pri ĝi tre favorajn opiniojn. Ĝi enhavas prozon originalan (Luiza Carol kaj Den Drown, respektive el Israelo kaj Usono) kaj tradukitan (Eliade kaj Laxness); poezion originalan (ia. de Ertl, De Kock, Mao, Nervi kaj Ragnarsson) kaj tradukitan; eseojn (de Ragnarsson kaj mian), recenzojn kaj, kiel dirite, la verkojn premiitajn en la Belartaj Konkursoj. Mi trovas la enhavon varia, interesa, plaĉa, kvalita, kun sufiĉe alta nivelo, kaj la samo validas ankaŭ por la fotoj.



– *Kiel pasis la prepar-laboro por la eldono? Kiu pri kio respondecis? Ĉu ĉio pasis glate? Kiu problemoj vin alfrontis?*

– Por mi temis pri mia unua sperto serioze redakti revuon, cetere novformatan, novstilan en Esperantujo. Dank’ al la interreto kaj retroŝto kaj la kunhelpa laboremo de miaj kolegoj ĉio iris sufiĉe glate. Temas fakte pri kunrespondeco, pri efektiva kunredaktado de la revuo.

– *Ĉu okazis io tute neantaŭvidita dum la preparo de la unua volumo?*

Pro la suma longeco de la BK-premiitaj verkoj ni devis ŝovi plurajn kontribuojn al BA2.



Personoj kaj private min surprizis la ne tro alta nivelo de la premiitaj teatraĵoj, sed, nu, laŭ la interkonsento ni devas publikigi ilin ĉiujn. Tiel la legantoj povos mem kompari kaj juĝi.

– *Kiaj estas viaj planoj kaj esperoj rilate la estontecon de via almanako?*

– Aperigi 2 numerojn jare kaj, se eble, eĉ 3 ekde 2009. Plivigli la kulturpanoramon de Esperantujo, plifortigi la Belartajn Konkursojn, disponigi lokon, por ke novaj talentuloj prezentu siajn verkojn.

– *Kian kunlaboron kaj kiajn kontribuojn vi bezonas? Kiel averaĝa esperantisto, ekzemple, leganto de KONTAKTO, povas helpi al vi en via laboro?*

– Ĉio beletra bonvenas: prozo aŭ poezio, originala aŭ tradukita, eseoj, recenzoj... Ankaŭ ilustraĵoj (fotoj aŭ desegnoj)! Oni povas helpi nin du-maniere: sendante verkojn, kontribuojn ktp., kaj aĉetante kaj legante la revuon.

Verdire, ni ege ĝojus ricevi tekstojn verkitajn de junuloj. Pro mia aĝo (jam 41!) mi ne plu havas rektajn kontaktojn en kongresoj kaj simile kun verkemuloj de la pli juna generacio. Espereble, ĉi intervjuo utilos por establi tian fruktodonan “kontakton”.

– *Vi estas homo sendube kompetenta pri la Esperanta literaturo, tial enkadre de la ĉefa temo de tiu ĉi KONTAKTO-numero mi volus iom priparoli kun vi tion. Laŭ via pritakso, kia estas la stato de la Esperanta literaturo, mi diru, absolute mezuri-*

ta (do, kiel ĝi fartas ĝenerale) kaj kia ĝi estas nun kompare al la antaŭaj tempoj?

– Se konsideri la cirkonstancojn kaj kompare al la nacilingvaj literaturoj, mi povas diri, ke nia literaturo iĝis vere atentinda nur nun – post 120 jaroj da ekzisto. Tamen iuj ĝenroj, kiel la poezio, certe montris pli da evoluo ol, ekzemple, la teatro. Mia opinio necesas plivastigi la publikon, la anemian libromerkaton de Esperantujo, por ke niaj eldonistoj kaj aŭtoroj povu alfronti pli defiajn taskojn.

Koncerne la komparadon kun la antaŭaj tempo, sincere, mi ne scias, kion diri. Ĉiu jaro, ĉiu nova verko estas plia ŝtupo aŭ paŝo, kaj oni jen kaj jen atingas novajn pintojn, kiel lastatempe en la poezio de Mao Zifu. Laŭ mi estas tro malmulte da aktivaj verkistoj, plejparte izolitaj. Se paroli pri romanoj, ŝajnas al mi, ke la ondo aŭ lavango de la okdekaj kaj naŭdekaj jaroj jam moderiĝis, almenaŭ kvante. Ĉiel ajn nur malmultaj el tiuj romanoj estis vere altkvalitaj.

– *Kio, laŭ vi, estas la plej fra-paj apartaĵoj, problemoj kaj, male, pozitivaj de la Esperanta literaturo kompare al la literaturoj nacilingvaj?*

La ĉefa problemoj estas la manko de publiko. Kaj la diletanteo de multaj aŭtoroj. Kiel la plej-ĵan pozitivajon mi opinias la faktan, ke temas pri literaturo efektive tutmonda, punta, interkultura kaj, iasence, translingva, ĉar iel ĉiu Esperanta aŭtoro devas kon-

stante rememori, ke li verkas en aparta intergenta lingvo; ni ne povas verki rekte, kvazaŭ sen-pense, kvazaŭ aŭtomate, kvazaŭ lingvoj ne ekzistus, kiel eble faras iuj aŭtoroj nacilingvaj.

– *Iom lingvistika demando. Arta literaturo en Esperanto estas, verŝajne, la ĉefa fonto kaj kialo por pliriĉiĝo, sed samtempe plikompliĝo de la lingvo. Kiel, laŭ vi, interrilatas la nocioj “riĉa lingvo” kaj “facila lingvo”? Ĉu Esperanto povas daŭre resti facila? Ĉu eblas altkvalita literaturo per nur simplaj vortoj?*

– La kvalito de literaturo dependas ne de la uzataj vortoj, sed de tio, kion oni diras kaj kiel oni diras tion. La enhavo, nur la enhavo devas decidiĝi la lingvaĵon uzotan. Banalaĵo kun multaj neologismoj restas banalaĵo; la samo validas ankaŭ por banalaĵo en “la bona lingvo”. Kaj certe eblas altkvalita literaturo per “simplaj vortoj”. Sed verkistoj kaj ĝenerale Esperanto-parolantoj devas havi je sia dispono riĉan lingvon por ĉiaj uzoj, beletraĵoj aŭ teknikaj, ĉiutagaj aŭ esceptaj. Bedaŭrinde, multaj homoj tion ne komprenas kaj do historie atakas jen malvortojn, jen neologismojn. La rezulto estas, ke por traduki prozaĵojn en Esperanton, oni kvazaŭ devas elekti inter lingvosimpligaj korsetoj aŭ la piĉ-iltisaj* ekstravagancoj. Sed niaj plej bonaj aŭtoroj ja sukcesis

trovi sian propran, mezan vojon.

– *Ĉu, laŭ vi, estas vero, ke la Esperanta literaturo jam havas atingojn, kompareblajn al la nacilingvaj literaturaj atingoj aŭ eĉ superajn al tiuj? Oni ofte asertas tion, sed kion fakte ni povas mencii ĉi-rilate sen blufi kaj troigi?*

– Oni havas plurajn tiajn atingojn, sed ne multajn. Ĉefe en la poezio, de Auld kaj Ragnarsson ĝis Nervi aŭ Mao. En prozo mi menciis “La Litomiŝla tombejo” de Piĉ aŭ “Sed nur fragmento” de Steele, sed certe ne la mezkvalitajn romanojn de Nemere. Unu el la problemoj en Esperantujo estas la malalta nivelo de nia kritiko: multaj recenzoj ne kuraĝas paroli negative pri fuŝaĵoj; aliaj, male, obsediĝas pri kompostkoboldoj kaj aliaj imagataj eraroj...

– *Mi iom pliĝustigu: ĉu laŭ vi la nomumo de forpasinta Auld kiel kandidaton al Nobel-premio pri literaturo estis adekvata paŝo? Ĉu vere temis pri la rekono de liaj literaturaj meritoj aŭ nur pri la “politikaj” penoj disfamigi Esperanton kiel literaturan lingvon?*

– La tutan demandon pri la literaturaj Nobel-oskaroj mi persone trovas absurda. En la kazo de Auld temis klare pri Esperantuja “politikumado”, kiel vi diras, aŭ propagando, ĉar ekzistas nenia ŝanco, ke unu el niaj verkistoj ricevos tiun premion, sendepende

de la literaturaj meritoj, nedubeblaj ĉe Auld aŭ, nun, ĉe Ragnarsson, kandidato proponita de EVA (Esperantlingva Verkista Asocio). Se kelkaj emas peni por tio, nu, en ordo, sed mi preferas dediĉi mian tempon kaj energion al aliaj aferoj.

– *Laŭ viaj personaj spertoj, ĉu multaj esperantistoj kapablas vere kompreni kaj ĝui la altnivelajn literaturajn verkojn en Esperanto? Ĉu vi iam sentis vin “poeto sen popolo”?*

– Escepte de iuj furoraĵoj kiel, ekz., “La ŝtona urbo”, publikigita jam en 1200 ekzempleroj, plej multaj verkoj en Esperanto aperas eldonkvante de nur 200 aŭ 300... kaj preskaŭ neniam elĉerpiĝas! Jes ja, foje mi sentas, ke mi verkas nur por kelkaj dekoj da homoj.

– *Kiaj, laŭ vi, estas la perspektivoj de la Esperanta literaturo kaj kio estas la plej problemaj punktoj, pri kiuj la esperantistaro devas ĉefe labori por sukcesigi ĝin?*

– Ni verku literaturon pri la mondo kaj interesan ankaŭ por la tuta mondo, ne nur por nia rondeto – jen nia defio. Ĉiu peco de la Esperanta literaturo estu tradukinda, eĉ se neniu iam ajn ektradukos ĝin.

– *Koran dankon pro la intervjuo. Mi deziras sukceson al via almanako kaj al vi en via krea vivo!*

Intervjuis P. Mojajev

* La vorto “piĉ-iltisa” referencas al la verkisto K. Piĉ kaj al la t.n. “Iltisa skolo” (kies reprezentantoj estas i.a. Fernando de Diego kaj Reinhard Haupenthal; la skolo nomiĝas laŭ la nomo de la eldonejo (Artur E.) Iltis) – ĉiuj famaj pro la uzado de iom eksperimenta kaj neologismo-riĉa lingvaĵo.

Pri la intervjuato:

Jorge CAMACHO (nask. 1966, Hispanio) profesie estas paroltradukisto. Liaj ĉefaj verkoj: eseoj “La liturgio de la foiro”, rakontoj en “Sur la linio” kaj “Ekstremoj”, prozaĵo “La ĉapo de la sterko-vermo”, novelo “La Majstro kaj Martinelli”, poemaroj “Celakantoj”, “Saturno” kaj “Eklipsas”. Li tradukis “Letero el Palestino” de Santiago Alba.

<Rete>

Pri J. Camacho:

<http://jorgecice.blogspot.com>
<http://esperanto.net/literaturo/roman/camacho.html>

Pri Beletra Almanako:

<http://www.librejo.com/beletra-almanako/ba1/beletra-almanako-ba-1.html>
BA en la brokatalogo de UEA: <http://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=7835>

Beowulf – esperantiginda verko!


Michael Cayley, Britio

Ĉu vi ŝatas la romanojn de Tolkien – “La Hobito” kaj “La Mastro de l’ Ringoj”? Kaj ĉu vi scias, ke Tolkien verkante tiujn librojn estis multe influita de la anglosaksa literaturo? Fine, ĉu vi scias, pri kio temas unu el la ĉefverkoj de tiu literaturo – la epopeo “Beowulf”?

La anglosaksa lingvo estas malnova versio de la angla, tamen por la hodiaŭaj parolantoj de la angla ĝi estas preskaŭ nekomprenebla. Tamen ne malesperu: ne necesas aparte lerni la anglo-saksan por legi kaj ĝui la epopeon.

Ekzistas bonegaj tradukoj en la moder-nan anglan, interalie, tiu de la Nobel-premiita irlanda poeto Seamus Heaney.

Legante la verkon “Beowulf” oni eniras la mondon de monstroj, kie sen grandaj luktoj la vivo estas tute ne ebla. La titolo de la poemo devenas de la ĉefa persono, Beowulf – heroo, kiu devas riski sian vivon por defendi sian popolon. Li grave vundas la hommanganton Grendel. Ties patrino – eĉ pli kruela – deziras venĝon kaj la helpo de Beowulf estas denove bezonata. Li eniras la subkvan hejmon de Grendel kaj lia patrino, kaj tie li fine mortigas ilin.



La unua paĝo de “Beowulf”

Beowulf iĝas reganto. Post multaj jaroj, unu el liaj militistoj ŝtelas pokalon el la trezoroj de drako, instigante la drakon ataki la popolon. Do denove la jam maljuna heroo devas batali kontraŭ monstro. Mortigante la drakon, li mem estas mortvundita. La fino de la epopeo priskribas la funebron pri Beowulf kaj profetas katastrofon por lia nacio.

La eventoj, prezentitaj en la epopeo, estas vere ekscitaj. Tamen la poemo ne estas nura sinsekvo de virecaj aventuroj. Ĝi ankaŭ traktas eternajn literaturajn temojn, kiel la bono kaj la malbono, la celo de la homa vivo, la rolo de la individuo en la socio, la efemereco de imperioj kaj de la homa forto. La stilo estas bela kaj vigla, kaj foje la verko estas vere kortuŝa.

Ĝi ja certe estas esperantiginda, sed dume la Esperantaj tradukoj de ĝi ne aperis.

Morti kantante, vivi ridante

(rigardante la armenan libroŝrankon)

Yenovk Lazian, Germanio

Forgesu pri la nuna Armenio, terpeceto disŝirata inter grandaj potencoj, postrestaĵo de iam gloraj reĝlandoj. Dum jarcentoj ni, armenoj, al kutimiĝis al eksterhejmeco, al la vivo ĉiam survoje. Nia unua presita libro aperis en Venecio en 1512, nia unua gazeto naskiĝis en Madraso en 1794, niaj plej riĉaj bibliotekoj troviĝas en Venecio, Vieno kaj Jerusalemo. Nia kultura ĉefurbo en la 19a kaj komence de la 20a jarcento estis Konstantinopolo: ĝuste tien mi invitas vin. Alproksimiĝu al mia libroŝranko!

Jen poeto Misak Medzarenc (nask.1886), vivinta nur 22 jarojn, sed postvivinta tiom da ankoraŭ vivantaj poetoj...

*Donu, Sinjoro, ĝojon nememan al mi,
Mi flore kolektu ĝin sur mia vojo
De ĉies rigardoj ĉiutage...*

Medzarenc estas vera magiulo de vortoj. Li uzas tute nekutimajn sencojn. Oni ne komprenas liajn versojn, oni sentas ilin. Neniu antaŭe skribis tiel, nek iu skribis tiel poste. Li restis neimitebla, neatingebla, luma kaj pura. Sed la lumo de lia animo iom post iom forvelkas. La antaŭsento de la baldaŭa morto igis la poeton avide ĝui la belon de tiu ĉi mondo. Jen kelkaj disaj linioj:

*... ĉiuj boatoj foriris deziroplenaj
for de la skuĝema bordo de mia Revo...*

*Gajas la lumo reĝruĝa de la vespero
senbrue fuĝanta...*

*Al via kiso, ho nokto, mia fenestro estas
malferma.*

*Mi suĉu ĝissate la lakton fluetantan de
via volupta lumo*

*kaj la malsekan
sorĉecon de viaj
freŝaj radioj...*

Rupen Sevag (nask. 1885) ŝajnas al mi kontraŭulo de Medzarenc. Kuracisto, edukita en Svislando, li vidis ne nur la belan flankon de la vivo. Li priverkis vesperon, ĉiesulinon, la Morton rajdantan surĉevale...

*ĉu scias vi, kiu poeto
plej malgaje kantas?
tiu, kiu ne plu kredas al Amo kaj
Printempo,
ĉio ĉirkaŭe ankoraŭ kantas kaj ridas,
sed certas li, ke li baldaŭ cindriĝos...*

Kaj jen Siamanto (nask.1878):

*Kaj vi sur ĉi purbrilaj folioj prikantu la
doloron de la gento kaj la forton de la
gento,
Donace al la naskotaro kaj al la malĝo-
jo de l' pasinteco,
Jen orfas mi kaj ribelas, adiaŭ, mi iras
serĉi miajn pereintojn,
Donu al mi unu kanton de viaj kantoj,
unu kanton: mi kantante volas morti!*

Taniel Varuĵan (nask.1884) mense revizitas Venecion, kie pasis lia junaĝo:

*Marblua Venecio, gloroplana reĝino,
kiun Italio per vino satigis!
Kaj la Oriento per siaj gemoj altprezaj
Ornamis viajn fruntojn kaj senfortajn
piedojn...*

Tiom similaj en la streboj, revoj, lukto, viv-avido kaj tamen tiel malsimilaj voĉe, melodie, bilde kaj vorte, Rupen Sevag, Siamanto kaj Taniel Varuĵan estis murditaj samtage kaj samloke, en la nigra jaro 1915 – la jaro de amasaj murdoj de armenoj en Turkio...

Sed ni iru reen tra la tempo... Tiam en Konstantinopolo vivis armena verkisto Hagop Baronian (1843-1891), pensante pri kiu mi foje bedaŭras, ke li apartenis al nia etnombra popolo... Se li estus eŭropano, lia nomo tondrus. Li verkis ankaŭ greke, turke kaj france, sed ĝuste



Armena ĉiutaga gazeto "Haraĉ", aperanta ekde 1925 en Parizo

por armenoj li estas pli ol klasikulo. Li instruis nin ridi kaj ridigi. Li iĝis parto de ĉiuj ni. Foje ni citas liajn verkojn tute senkonscie.

– Portu supren ĉi tiujn kofrojn kaj litaĵojn, – krie ordonis la sinjorino. La portistoj obeeme reprenis la ŝarĝon, sed ili apenaŭ surpaŝis la unuan ŝtupon, kiam la dommastrino denove kriis:

– Ĉu vi venas de la montaro?

– Ne, de la ĉefstrato...

– Mi scias ja, ke de la ĉefstrato.

Rigardu viajn ŝuaĉojn: mi hodiaŭ purigis la plankon ĝislace dum la tuta tago!

– Kion do ni faru, ni ne havas aliajn ŝuojn...

– Do demetu ilin kaj ek!

– Ne krii, sinjorino, ne krii. Ni tuj demetos ilin.

La portistoj demetis la ŝuojn, kiuj tamen estis pli puraj, ol iliaj piedoj.

– Do, ĉu per tiaj piedoj vi volas eniri?! – timkolere demandis la dommastrino.

– Aliajn piedojn ni ne havas, – respondis la ĵusaj eksvilaĝanoj tiel humile, ke oni povus pensi, ke nur pro la malriĉeco ili ne havis pli ol du piedojn, dum la riĉuloj havas po kvar, kvin kaj eĉ ses piedojn...

(el la romaneto "Althonorindaj almoŝpetantoj")

Avareco, stulteco, nesciemo, nelernemo: ĉio ĉi prirideblas dank' al Baronian kaj ekde Baronian. Iom post li venis Jervant Odian (1869-1926). Se Baronian verkis relative mallonge, kaj lia humoro ofte densas en kelkaj vortoj,



La unua armena gazeto "Aztarar" (Madraso, Hindujo), 1794, bindita kolekto

Odian havis neelĉerpeblan verkistan spiron; li verkis romanegojn, kiuj estis ridigaj de la komenco ĝis la fino. En 1908 li verkis profetaĵon nomitan “Kamarado Panĉuni”. La nomo mem estas moka armenigo de la vorto “proleto”. Ĝisosta marksisto organizas tutmondan revolucion en kelkdoma vilaĝeto. Li surgluas propagandajn afiŝojn bedaŭrante, ke en la vilaĝo neniu scipovas legi krom la pastro, la klas-malamiko. Tamen post iom da tempo li malkovras, ke nekonata kontraŭulo forŝiras la afiŝojn. “Oni rebatu la kontraŭevolucion!” – krias Panĉuni. Tamen baldaŭ evidentiĝas, ke la malamiko estis... kaprino, kiun allogis la subafiŝa farun-gluo. La romaneto estas verkita letermaniere, do pri la okazintaĵoj ni ekscias de Panĉuni mem. Lia lingvaĵo estas nekredible simila al tiu de komunistoj, kiuj ekregos en Ruslando dekon da jaroj poste. Kompreneble, la romano estis

malpermesita dum la soveta regado.

En 1926 Jehiŝe Ĉarenc verkis sian romanon “El la Korektada Domo”. Tiel dum la frusoveta tempo nomiĝis malliberejoj. Trans la ŝajne laŭda priskribo de la tiea vivo Ĉarenc montris la vivon de la tuta landego, kiu estis granda malliberejo. Kaj jam en 1926 li subskribis sian mortoverdikton per tiu romano. Oni taksis lin, ĉu sincere kaj nescie, ĉu malsincere kaj nesciige, poeto de la revolucio. Tia li estis nur komence, junaĝe. Poste venis resobriĝo... Kaj ĉiutaga lukto por la vivo. Ĉarenc verkis multon per kaŝita ezopeca lingvaĵo. Al la morto de Lenin li reagis per la poemo “Lenin kaj Ali”. Stambula fiŝkaptisto priploras la morton de la tutmonda proletgvidanto. Deekstere ĉio enordas: estas ja unu el multaj miloj da similaj poemoj. Tamen... Nur naŭ jarojn post la nigra 1915 senescepte ĉiu en Armenio klare komprenis, kies amiko ja estis Lenin kaj kiu fune-

bru... La agonio de Ĉarenc daŭris ĝis 1937. En la kvindekaj jaroj oni forigis la malpermeson de sur lia nomo. Tamen legi inter la linioj, kompreni la veran sencan de liaj vortoj estis daŭre malpermesate. Sed fine aperis la plej lastaj poemoj de Ĉarenc, kaj la verego ne plu povis esti kaŝata.

Kelkdeko da linioj tute ne sufiĉas eĉ por unu librobreto... Mi ellasas multajn grandajn nomojn. Ĉiu meritas apartan prezenton – bedaŭrinde ne ĉi-artikole. Neeviteble oni demandos min pri la nuno de la armena literaturo. Kaj mi volus ĉiupreze eviti tiun neeviteblan demandon. Jes ja, iu verkas, io aperas. Vivas poeziistoj. La poetoj preskaŭ malaperis, kvankam ie kaj tie briletas unuopuloj. La lasta granda armena poeto loĝas ie en la Libana montaro. Li nomiĝas Apraham Alikian. Senvivrimeda, duonblinda, preskaŭ okdekjara, nevizitata kaj iom post iom forgesata, li tamen plu verkas.

Novtipa literaturo: bildstria ĵurnalismo

François Parchemin, Francio

Per tiu artikolo mi volus prezenti al la legantoj de KON TAKTO novtipan literaturon, kiun mi malkovris antaŭ kelkaj jaroj. Temas pri aparta speco de bildstrio, prezentantaj veran historion: foje temas pri membiografieto de la aŭtoro, sed pli ofte temas pri ĵurnalista raportaĵo. Eblas nomi tion “bildstria ĵurnalismo”.

Tiu literatura ĝenro konas internaciajn heroojn. La plej fama certe estas Art Spiegelman, kiu iniciatis la ĝenron per “Maus”. La duvoluman verkon li publikigis en 1986 kaj 1991. En la libro la aŭtoro petas sian patron, judan polon, rakonti pri tio, kiel tiu postvivis Holokaŭston. La temo estas serioza kaj la desegno estas realeca, tamen Art Spiegelman prezentis judojn kiel musojn, germanojn kiel katojn, polojn kiel porkojn, usonanojn kiel hundojn, ktp. La verko senprecedence allogis la atenton de la recenzistoj. Art Spiegelman ricevis multajn

premiojn, interalie la specialan Pulitzer-premion en 1992.

Alia grava usona verkisto estas Joe Sacco. Lia verko ĉefe temas pri milito. Li unue verkis “Kiel mi amis la militon”, kie li analizas la sentojn de televidspektantoj dum la Gofa milito. Post la restado en Proksim-Oriento, li publikigis duvoluman bildstrian raportaĵon sub la titolo “Palestine”. Dank’ al tiu verko li iĝis iniciatinto de bildstria ĵurnalismo. Same kiel Art Spiegelman, li prezentas sin mem en la libro, sed temas ĉi-foje pri vera surkampa ĵurnalismo. Por la unua volumo li ricevis la premion “American Book” en 1996.

Post restado en Bosnio dum la milito li verkas plurajn librojn, ĉefe “Goraŝde”, kiu estas fakte kroniko de la restado de Joe Sacco en tiu bosna enklavo. Li desegnis siajn ĉiutagajn okupojn en tiu almitata urbo kaj atestaĵojn de la loĝantoj kaj

militistoj, kiuj defendis la enklavon. La libro temas pri amasbuĉoj inter najbaroj, nutrajmankoj por civiluloj kaj teruraĵoj sur la paflineo. Pri la balkana milito Joe Sacco verkis ankaŭ “Ŝoba” kaj “The Fixer”, kies herooj estas la “fiksantoj” – lokanoj, kiuj helpas la eksterlandan ĵurnalistaron per tradukoj kaj aliaj servoj. Legado de tiaj libroj estas, kompreneble, pli impona kaj kortuŝa, ol la legado de kutimaj ĵurnalistaj artikoloj.

Impona estas ankaŭ la verko de Marjane Satrapi. Ŝi estas iran-devena franca desegnistino, fama pro sia ĉefverko “Persepolis”. Denove temas pri membiografia bildstrio: per kvar volumoj ŝi rakontas propran historion de la irana revolucio ĝis alveno en Francion. Tra infanaj okuloj ni vidas la batalon de ŝiaj gepatroj kontraŭ la Ŝaho, la ĉiutagan vivon post la islama revolucio, kio okazis dum la gimnaziaj jaroj en



Aŭstrio, ktp. Kompreneble, temas pri potenca atestilo kontraŭ religia ekstremismo, tial tiuj libroj estas malpermesitaj en Irano. “Persepolis” estis adaptita al kino en 2007 kaj la filmo eĉ gajnis premion en la Kanna Festivalo. Post tiu fama verko ŝi verkis du samspecajn librojn pri Irano: “Broderies” (“Brodadoj”) pri seksa vivo de virinoj en Irano kaj “Poulet au prunes” (“Kokidaĵoj kun prunoj”) pri onklo muzikema.

En tiu eta artikolo mi prezentis nur la plej famajn verkistojn de tiu ĝenro. Tamen la ĝenro estas sufiĉe populara (famaj usonaj gazetoj eĉ akceptas bildstriaĵajn raportaĵojn), do vi certe havos la okazon konatiĝi kun multaj aliaj reprezentantoj de tiu arto.

Fantasta mondo de Andrzej Sapkowski



Gabriela Kosiarska, Pollando

Antaŭ monato sur la monda merkato debutis la komputila ludo “The Witcher” (pole – “Wiedźmin”, tradukebla kiel “Sorĉisto”), preparita fare de la pola firmao “CD Projekt” kunlabore kun la monda potenculo “Atari”. La ludo bezonis nur semajnon por supervenki ĉiujn komputil-ludajn rekordojn jam registritajn en Pollando. Dum 3 tagoj ĝin aĉetis 350 mil personoj. En Usono – la plej granda merkato de komputil-ludoj en la mondo – ĝi okupis la sepan lokon inter la plej volonte aĉetataj komputil-ludaj rolludoj. Granda ret-portalo IGN, dediĉita al la elektronikaj distroj, atribuis al ĝi la premion “IGN Editor’s Choice Award”, per kiu oni distingis nur la plej bonajn produktojn en ĉiu el la pritaksataj kategorioj. La vizitantoj de la portalo atribuis al la ludo 9,4 el 10 eblaj poentoj.

La ĉefaj atutoj de la ludo estas la grafiko, muziko, bataloj kaj la maniero gvidi la sorton de la ĉefrolanto – sorĉisto Gerald el Rivia. Nome, la ludanto farante unuopajn decidojn influas la evoluon de la historio kaj – kio ege gravas – la rezultoj de la decidoj fariĝas videblaj nur

post longa tempo, do komence ne eblas ilin antaŭvidi. Depende de la decidoj estas eblaj tri malsamaj finoj de la ludo. Por interesiĝantoj indas noti, ke la oficiala paĝaro de la ludo legeblas en 10 lingvoj.

Sed ege interesa estas ankaŭ la fakto, ke la ludo mem kaj ĝia aparta atmosfero baziĝas sur la rakontoj kaj romano de pola verkisto Andrzej Sapkowski. Tiu verkisto jam akiris ĉiujn eblajn premiojn pri la fantasta literaturo en nia lando. Liaj sume 7 libroj, konsistigantaj la kolekton pri Sorĉisto, iĝis furo-raĵoj tuj post la apero (en la 90-aj jaroj de la pasinta jarcento) kaj daŭre okupas pintajn lokojn inter la plej ŝatataj libroj de poloj. Foje oni povis vidi gejunulojn, kiuj legas ilin, simple surstrate. La verkoj de Sapkowski estis menciataj eĉ dum lecionoj fare de instruistoj pri historio, ĉar la libroj estas mergitaj en la mezepokan mondon, kiun la aŭtoro priskribas sufiĉe fidele. Cetere, dank’ al tio neatendite montriĝis, ke ŝajne maldiligentaj lernantoj povas perfekte distingi diversajn tipojn de mezepokaj glavoj.

Kiu do estas la heroo de Andrzej Sapkowski – Gerald el Rivia, nun konata al ĉiuj poloj? Sorĉisto (speco de batalanto, membro de mistera kunularo) havas la taskon pro-

tekti homojn kontraŭ monstroj minacantaj al ilia sekureco, pro kio li prenas monon. Se ne ekzistus sorĉistoj, la vivo de multaj homoj estus endanĝerigita aŭ eĉ ne plu ebla. Tamen la homoj ne rilatas al sorĉistoj kun estimo, respekto aŭ simpatio. Eble, pri tio kulpas la fakto, ke la infanoj, kiuj volas studi de la sorĉistoj ties eksterordinarajn kapablojn, estas subigitaj al kruelaj testoj, kiujn sukcesas transvivi nur elcento de ili. Pro tio la homoj ofte perceptas sorĉistojn senigitaj je ĉiuj sentoj aŭ homaj bezonoj. Tamen, atente legante la libron oni konstatas, ke Gerald, eĉ ne estante homo, spertas multegajn homajn sentojn kaj montriĝas pli homa, ol la averaĝaj reprezentantoj de tiu ĉi raso. Plurfoje li sola prentas helpi iun, eĉ sen ricevi ajnan rekompencan.

Kiel notis unu kritikisto, “Sapkowski havas eksterordinaran kapablon rakonti, elpensi sensaciajn eventojn, krei sugestan agordon kaj iom post-iom krei streĉan etoson. Krome, li disponas pri brila, iom ironia humursento”. En liaj verkoj multas “oraj” pensoj kiel, ekzemple, “Pli bone estas sencele iri antaŭen ol sencele stari surloke, kaj, certe, eĉ pli bone, ol sencele retiriĝi” aŭ “La mondo ŝanĝiĝas, la suno subiras kaj vodko finiĝas”. Certe eblas

diri, ke la ciklo pri Sorĉisto havas slavan etoson, sed samtempe ĝi ne estas verko fermita por personoj el la aliaj literaturaj tradicioj. Antaŭ ĉio la rakonto pri Gerald estas historio de homo, kiu sola strebas batali kontraŭ la destino, revante nur pri la eblo trankvile kunvivi kun la aliaj. Samtempe li tamen ne kapablas kaj ne volas ŝanĝi siajn principojn aŭ fermi la okulojn pri la aferoj, kiuj laŭ li estas gravaj.

En la mondo, prezentita en la serio, preskaŭ mankas feliĉo. La situacioj varias, foje ŝajnas belaj, sed entute dominas kruelo, brutaleco kaj interbataloj. La destino, kiun kontraŭbatalas Gerald, multfoje trompas la esperojn kaj atendojn de la legantoj, forte dezi-rantaj, ke li sukcesu. La tuta ciklo, en kiu fine ekardas totala milito, finiĝas malklare, la legantoj restas plenaj je timo. Kaj ĝuste la postan sorton de Gerald strebis rakonti la kreintoj de la jam menciita komputila rolludo, kun kiuj – notindas! – kunlaboris Andrzej Sapkowski mem.

<Rete>

www.thewitcher.com – la oficiala paĝaro pri la ludo “The Witcher”



PRI ZONAJ KAJEROJ

Aleksandro Galkin,
Rusio/Germanio

Ĉu multaj el vi konas la distrikton de Berlino, nomatan Moabit? Se oni hazarde ne estas berlinano, oni apenaŭ scias pri tiu centrourba distrikto proksima al la iama centra fervoja stacidomo "Zoologia Ĝardeno". Tamen por plejmulto de tataroj, kiuj loĝas ĉ. 2000 kilometrojn for de Berlino, la nomo "Moabit" fariĝis sinonimo por la nocio "kruela malliberejo", "ekzekutejo", ĉar ĝuste en la malliberejo, situanta en tiu parto de Berlino, estis tenata la plej brila kaj sprita tataro poeto Musa Ĝalil. Vere estis ironio de la fato, ke siajn plej brilajn, plej korusajn versojn Musa Ĝalil verkis ĝuste estante prizonulo, kaj estis plia ironio de la sorto, ke tiuj versoj, skribitaj en kelkaj kajeroj malgraŭ ĉiuj malpermesoj, ne perdiĝis post la ekzekuto, sed estis konservitaj kaj finfine estis publikigitaj.

La vivo-skizo

Musa Ĝalil estis jam sufiĉe konata kiel poeto kaj redaktoro de pluraj tataraj periodaĵoj, kiam en 1941 li estis vokita militservi. La neordinara sorto de la poeto, kiu naskiĝis en Orenburga regiono (Rusio) en la jaro 1906, studis komence en religia islama lernejo (*medrese*) kaj poste sukcese finis la literaturan fakultaton de Moskva Ŝtata Universitato, klarigas lian esceptan eruditecon kaj perfektan posedon de ambaŭ lingvoj: la rusa kaj tataro. Li multe verkas, redaktas porinfanajn periodaĵojn, poste laboris kiel ĉefo de literatura kaj arta sekcio de la tatarlingva gazeto "Komunisto" kaj sekretario de la Verkista Unio de Tataro Respubliko. Dum tiu antaŭmilita periodo li publikigis du libretojn kun versoj, sed ili tiam ne iĝis vere popularaj.

Dum la unuaj tagoj de la milito Musa Ĝalil estis vokita militservi ĉe la fronto, kie li plu laboris kiel ĵurnalisto. Junie 1942 li estis grave vundita kaj kaptita de la germana armeo. Post la resaniĝo Musa estis sendita al la Berlina malliberejo Spandau, kie li restis dum 2 jaroj, ĝis la 25-a de aŭgusto 1945, kiam li estis ekzekutita per gilotino.

Kvina kolono

Estante militkaptito Musa Ĝalil aktive partoprenis la kontraŭfaŝisman agadon. La germana milita estraro intencis krei batalionon kun la nomo "Idel-Ural", kiu konsistis el la reprezentantoj de nerusaj sovetiaj



Musa Ĝalil

popoloj (tataroj, ĉuvaŝoj, armenoj ktp). Kun la subteno de religiaj kleruloj oni provis agiti la neslavajn popolojn de Sovetunio batali kontraŭ la "slavaj sklavistoj", kaj per tio malgrandigi la homperdojn de la germana regula armeo. Estante grava kaj sendube karismo-hava personeco inter la militkaptitaj tataroj, Musa Ĝalil partoprenis en la komploto, kies celo estis ebligi fuĝon de la militkaptitoj kaj reagito de la varbitaj samnaciuloj. Tia

komploto, certe, estis vivdanĝera por li – kaj li bone sciis, ke se oni malkovrus la komploton, nenio povus savi lian vivon. Tamen, eĉ kiam li ne plu estis viva, lia laboro donis la fruktojn – la tuta bataliono kapitulacis al la Ruĝa Armeo.

La homoj, kiuj sukcesis travivi la terurojn de milita prizono en Germanio, tamen, ne longe restis feliĉaj pro la saviĝo. Multajn el tiu bataliono oni rapide forsendis al labor-koncentrejoj en Rusio aŭ pafmortigis. La frenezo de la Stalina reĝimo ekagis kontraŭ sia propra popolo...

Ĉu heroo aŭ perfidulo?

"Se oni estis militkaptita kaj elvivis, oni nepre estas spiono" – sub tiu devizo estis mortigitaj milionoj da eksaj militkaptitoj, dum milionojn da tiuj, kiuj ne estis rekaptitaj de la Ruĝa Armeo, oni deklaris spionoj kaj perfiduloj. Laŭ la atesto de pluraj militkaptitoj pri Ĝalil oni deklaris lin spiono kaj eĉ metis lian nomon en la liston de la plej grandaj malamiko de Sovetunio. Nur 10 jarojn poste, dank' al tute eksternaturaj penoj de multaj tataraj kleruloj, oni finfine reprenis tiun akuzon.

Oni devas konstati kun bedaŭro, ke se la vivo de la poeto ne estus tragike interrompita en la berlina malliberejo, lin eble atendus ne multe pli esperiga sorto de milita spiono en Sovetunio. Tial, verŝajne oni povas konsenti pri la paradoksa aserto, ke tiu ekzekuto savis la poeton kaj ties aŭtoritaton por la popolo.

Ŝoka heredaĵo

Dum Musa Ĝalil estis oficiale deklarita la plej danĝera malamiko de Sovetunio tute neatendite aperas kaj iĝas konataj liaj prizonaj kajeroj, kiujn oni nomas "Moabitaj Kajeroj" (tatare "Moabit däftärläre"). La unua kajero estis portita de la samprizonulo Kasim Mirŝan al la sovetia ambasadejo en

Romo, sed ĝi malaperis inter la aktoj de la kontraŭspiona procezo kontraŭ li, dum li mem poste pereis en Gulago. Nur du el la supozataj 6 kajeroj sukcesis atingi la popolon dank' al la belga samĉelulo de Ĝalil – André Timmermans – kiu portis ilin al belga ambasadejo post sia liberigo. En tiuj 2 kajeroj estas ĉ. 100 versaĵoj, kiuj nun konsistigas la kernon de poeta heredaĵo de Musa Ĝalil. En tiuj versoj oni povas vidi, kiom rezoluta kaj fidela al sia Patrio li estis, kiel sentime li batalis kontraŭ sia sorto.

Eĉ nun, 60 jarojn post lia morto, lia kontribuo al la tataro poezio daŭre estas la plej signifa; neniuj posta poeto sukcesis per siaj verkoj proksimiĝi al li. La ununura tataro opero, kiu estis surscenigita kaj dum pluraj jaroj ĝuas la publikan intereson en la tataro operejo, estis kreita laŭ lia verko "Altinĉaç" ("Orharulino"). Liaj patriotaj versoj ankaŭ nun tuŝas la koron kaj animon, kaj restas parto de la lerneja programo pri tataro literaturo.

Miaj kantoj

(fragmento)

Kantoj, kreskintaj el mia animo,
Floru en kara Patri' en liber'!
Kiom da forto en vi kaj esprimo,
Tiom da vivo vi havu sur ter'!

Mia sentar' en vi ĉiam akordos,
Vi estas plej bonaj jaroj de l' viv'.
Oni forgesos min, kiam vi mortos,
Oni memoros min, dum sonos vi.

Vi min instruis pri l' vivo libera,
Vi min instruis perej sen pal'.
Se l' tuta viv' estis kanto sincera,
Ankaŭ la mort' estu kant' de batal'!

(26.11.1943, tradukis P. Moĵajev)



Monumento (ĉ. 30 metrojn alta) omaĝe al Musa Ĝalil (Kazano, Rusio)

William Blake 250-jara: memor-festa omaĝo

Ralph Dumain, Usono

La 28-an de novembro 2007 oni festis la 250-an datrevenon de la naskiĝo de angla poeto kaj artisto William Blake [ŭiljam blejk] (28.11.1757 – 12.08.1827). Ĉi-okaze kaj omaĝe al tio mi volus resumi la perspektivon de la monda disvastiĝo de la studoj pri Blake. Dum la kvar jardekoj de mia esperantisteco miaj intereso pri ĝi pli ol unufoje ŝanĝiĝis, sed la Blake-afero ĝis nun restas unu el la plej gravaj. Jen la detaligo de la persona historio.

Unuaj kontaktoj kun William Auld

Unue mi estis studento de William Auld en Barrie, Ontario, Kanado en somero 1975. En la jaro 1987 ni rekonatiĝis letere. Inter la temoj, kiujn ni traktis, estis ankaŭ William Blake en Esperanto. Interalie, mi aŭdacis diri la jenon:

Mi scivolas, kial oni ne tradukas Blake Esperanten. Mi supozus, ke Blake konkordus kun la utopiisma menso. La nivelo de la profundeco de Blake estas tiel rara, ke oni devus havebligi lin al internacia komunumo per Esperanto. Mi sentas, ke beletrisma literatura filozofio regas en Esperantujo, kaj oni ne sufiĉe pripensas, kio plej meritas tradukon. Oni ne hontas traduki tedajn ŝovinismajn naciajn epopeojn, sed eĉ ne pripensas la aŭtorojn, kies mesaĝo povus pensigi kaj inspiri alil-

ingvulojn. Mi ne estas kvalifikita tradukisto, sed ofte min tentas la provo. Iu devas traduki Blake, ĉu vi?

Auld afable respondis al mi, dirante, i.a., la jenon:

Mi ne scias, kial “oni” ne tradukas Blake Esperanten. Verŝajne, ĉiu elektas laŭ sia gusto: mi faris miajn Blake-tradukojn dum mia “Blake-periodo”, nome kiam mi la unuan fojon renkontis lian verkaron en serioza studkunteksto. Mi havas tiun kutimon. Kiam mi aliras novan por mi poeton kaj tiu ekplaĉas al mi, mi ne povas ne traduki kelkajn poemojn: per tradukado oni plej profunde ekkonas la originalojn. Alie, oni komisiis al mi iun traduktaskon – ekzemple la Ŝekspirajn sonetojn. Sed io devas stimuli, kaj la tasko devas allogi. Kial vi ne provu pri Blake?

En la jubilea jaro 1987, kiam mi korespondis kun Auld, mi multilate aktivis, ekz. kunfondis novan fakan asocion – Ateistan Tutmondan Esperanto-Organizon (ATEO). Mia perspektivo por tiu kaj por la cetera agado estis ne la malrealisma praelisma revo agi kvazaŭ en vakuo, sed mi celis fari ion vere praktikan, eĉ se modest-ampleksan. Mia perspektivo estis ekspluati la jam ekzistantan komunik-reton de Esperantujo por ŝtopi breĉojn en la interlingva fluado de informoj per provizado de eble utilaj publikaĵoj, t.e. plenumi unikan servon.

Turnante la atenton al William Blake,



William Blake (pentraĵo fare de Thomas Phillips)

mi rimarkis, ke publikigitaj estis nur kelkaj liaj tradukoj, plejparte en la “Angla Antologio” (1957). Mia opinio, la mesaĝo de Blake tiom gravas, ke nura beletrisma perspektivo ne estis kontentiga. Mirinde, sed ja ekzistis ankoraŭ unu traduko, tiam ankoraŭ ne konata al la esperantistaro...

G. E. Bentley pli juna, fakulo pri Blake

G. E. Bentley pli juna estas la plej eminenta fakulo, kiu arigas dokumentojn kaj bibliografiojn pri Blake. En la jaro 1982 mi sendis leteron al Bentley pri la bibliografio, kiun mi trovis en lia laŭcele kompleta bibliografio pri Blake, “Blake Books” (“Blake-libroj”). Temas pri la sola esperantaĵo en la libro; sed tiun tradukon mi, bedaŭrinde, povis trovi en neniu biblioteko de Usono. Mi volis ricevi kopion de ĉi tiu traduko kaj enmetis kun mia letero al Bentley kopiojn de la poemoj de Blake el la “Angla Antologio”. En sia respondo Bentley rekomendis al mi serĉi la deziratan publikaĵon en la bibliotekoj en Tokio aŭ Kioto. Li esprimis intereson pri bibliografio kompilota de mi pri Blake en Esperanto, supozante ke ĝi estus tre mallonga bibliografio. Lin speciale interesis originalaj verkoj en Esperanto pri Blake. Mi enketis ĉe la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno – tie troveblis nur la enhavo de la “Angla Antologio” kaj la disertacio de Margaret Hagler (vidu sube).

Mi sukcesis trovi la “perditan” tradukon de Blake nur en 1986 dank’ al japana esperantisto Toŝio Teraĵima, kiu sendis al mi la kopion de la poemo, prenitajn el la Japana Parlamenta Biblioteko. Tiam mi eksciis, ke la traduko unufoje aperis en “Amerika Esperantisto” junio 1911. La



Pentraĵo “Newton” fare de William Blake



Nigruleto (fare de William Blake)

traduko estis vere preskaŭ perdita, ĉar eĉ W. Auld, kiu havis preskaŭ kompletan kolekton de Esperanto-literaturo, neniam antaŭe sciis pri ĝi.

Bentley kompilas statistikon

Notindas, ke Bentley ĉiujare publikigis bibliografian suplementon pri novaj kaj nove eltrovitaj publikaĵoj kaj aliaj Blake-rilataj aferoj, i.a., la resumoj de la kritika literaturo (kaj ties tendencoj) en diversaj landoj kaj lingvoj. Surbaze de tiuj esploroj aperis la artikolo “Blake kaj la alilingvuloj: Alilingvaj kritikistoj kaj kleruloj pri Blake” (“*Blake and the Xenoglots: Strange-Speaking Critics and Scholars of Blake*”), per kiu Bentley ambiciis prezenti la statistikan superrigardon de ĉiuj kritikaj studoj pri Blake inter la jaroj 1780-2004! Kompreneble, tia esploro ne povas atingi perfektajn rezultojn; tamen ĝi estas la plej bona resumo ĝis nun ekzistanta.

En la eŭropaj lingvoj la statistiko ne surprizas: plej pintas la franca (267 verkoj) kaj la germana (254), ilin sekvas la itala (155), hispana (180), rusa (90), ĉeĥa (12), dana (18), nederlanda (8), finna (7), greka (14), norvega (8), pola (18), portugala (16), sveda (16). Ekster Eŭropo eĉ ne unu verko troveblis en lingvoj birma, turka, araba, bengala, hindia, panĝaba, tamila. Troviĝis tre malgranda kvanto de verkoj en la ĉina, supozeble pro la politika izoleco de la Popola Respubliko; la plejparto de la verkoj devenis de Tajvano.

Ege surprizaj estis la rezultoj pri la korea kaj la japana. Estas pli multe da eseoj pri Blake en la korea, ol en ajna alia lingvo (krom manplenetato de ĉefaj eŭropaj lingvoj), sed, kurioze, *mankas korea traduko de Blake mem!* Ekzistas mirinda kvanto de verkoj pri Blake en Japanio, ekzemple, dum la jaroj 1994-2004 64% de fremdlingvaj ĉi-temaj verkoj estas japanlingvaj. Bedaŭrinde, oni preskaŭ ne tradukas tiujn verkojn anglalingven.

Kio estis Blake kaj kial li plu gravas?

Dum sia vivo Blake estis profesia artisto, gravuristo. Li bildigis la librojn de aliaj kaj verkis proprajn poemojn kaj integrigis multajn el ili kun la propra arto kaj mem presis siajn “iluminatajn” verkojn, ekz. sian plej faman kompilaĵon, *Kanzonoj de Malsperto kaj Sperto*. Sed kiel politika kaj artista radikalulo kaj malkontentulo el la metiista klaso, li restis sen famo kaj riĉo en sia vivtempo, kaj vendis proprajn verkojn nur al kelkaj riĉaj patronoj, kiuj ne komprenis liajn verkojn. Kelkaj famuloj kaj poetoj dum la 19-a jarcento promociis lian reputacion aŭ iniciatis interpretadon de liaj obskuraj poemoj kaj personaj mitologio kaj simbolaro. Okazis salto de intereso pri Blake en la 1920-aj jaroj. Tamen nur en la 1960-aj jaroj la meritoj de Blake estis vaste agnoskitaj: li estis akceptita al la t.n. “Granda Sesoj” de la anglaj romantikaj poetoj.

Neniu alia poeto fosis tiom profunde kaj kritike la homajn naturon kaj socion, ekzamenante kaj subfosante niajn fundamentajn antaŭsupozojn kaj elvokante misterajn kaj maltrankviligajn subteraĵojn. Blake, ridetante al nia malsatega menso per sia inteligento, kiel neniu alia homo kapablas plenigi nin je nepriskribebla ĝojo kaj helpi nin travivi ĉiujn korrompojn.

La gamo de Blake – temas pri la poezio (eĉ sen tuŝi la bildaron) – ampleksas preskaŭ ĉion inter la plej simpla, sed profunda liriko ĝis la plej esoteraj kaj obskuraj mitaj konstruaĵoj. Por plena kompreno de lia verkaro bezonatas esploroj pri la tiuepokaj lingvaĵo, pensaroj kaj ceteraj aferoj politikaj, sociaj, religiaj, mistikaj, filozofiaj, geografiaj, artaj, literaturaj, ideologiaj... En diversaj versaĵoj enestas jen la plej simplaj kaj ĝeneralaj lingvaĵo kaj temoj, jen la plej malfacile kompreneblaj kaj kulture kaj persone specifaj signifoj. La tiel nomataj “Profetaj libroj”, en kiuj oni trovos la personan mitologion de

Blake, estas ege malfacile penetreblaj por la tradukontoj.

La temaro inkluzivas longan liston de ŝlosilaj temoj, jen kelkaj: soci-klasa hierarkio kaj subpremado, malriĉeco, sklaveco, malamikaj rilatoj inter viroj kaj virinoj, regantaj ideologioj an arto, filozofio, religio, politiko, subpremado de la seksimpulso kaj de la ina sekso, falsaj religiaj kaj teologiaj konceptoj ortodoksaj, klasociaj – entute, la nekonsciaj ideologiaj kaj moralaj sistemoj dum la tuta homa historio, kiuj baziĝas sur la logiko de dominado, subpremado, timo kaj nescio.

Certe, Blake havas siajn proprajn strangaĵojn, nekonskvencaĵojn, provincaĵojn, antaŭjuĝojn, sed, kiel memlerninto el malelita klaso en subpremanta socio, li elfosis la komprenojn preter la kapablo de siaj samtempuloj. Do, mi invitas vin ekkoni lian verkaron, ĉu anglalingve, ĉu vialingve, ĉu Esperante. Ĉiuokaze, mi feliĉas senŝarĝiĝi de la sentata devo memor-festi ĉi tiun mejloŝtonan datrevenon.

Blake en Esperanto

De post miaj kontaktoj kun William Auld mi sukcesis kolekti kelkajn pliajn tradukojn el Blake kaj eĉ kelkajn menciojn kaj aludojn pri Blake en la originala Esperanto-literaturo. Margaret Hagler en sia doktoriĝa disertacio analizis la tradukon de “La Tigro” (fare de Auld) kompare al la angla originalo kaj la franca traduko. Mi kompilis bibliografion de ĉiuj Blake-rilataj aferoj kiu troveblas ĉe mia retejo (vidu sube). Mi bonvenigas ĉiujn aldonojn al tiu bibliografio. Kompreneble, mi invitas esperantistojn traduki pliajn verkojn de Blake en nian lingvon por disvastigi lian verkaron al la homoj, kiujn ĝi ankoraŭ ne atingis.

<Rete>

<http://www.autodidactproject.org/bib/blakebib-espo.html> – William Blake en Esperanto (ĝisdata gvidilo al ĉiuj ĉi-temaj retpaĝoj)

<http://eo.wikipedia.org/wiki/Blake> – William Blake en Esperanta Vikipedio

<http://www.autodidactproject.org/guid-blake.html> – William Blake Study Guide (ĝenerala anglalingva retgvidilo)

Hermetismo en la itala poezio de la 20a jarcento

Nicolino Rossi, Italio

<nicolino.rossi@esperantanapolo.info>

La termino *hermeta* kaj/aŭ *hermetika* lau la NPIV signifas: 1. *perfekte fermita, tiel ke la aero, akvo ks ne povas enpenetri*. 2. *tre malfacile penetrebla por la intelekto: hermetika poezio*. La termino *hermetismo* tute ne estas listigita en nia vortarego, kvankam sub la dua signifo oni ja mencias ekzemplon rilatan al poezio. Tamen, oni vaste uzas la terminon *hermetismo* (itale: *ermetismo*) rilate al unu el literaturaj skoloj, ĉefe itala, kiu koncernas plejparte poezion.

La termino “hermetismo” aperis kaj ekcirkulis en la itala poezio komence de la 1930aj jaroj, tamen ĝi fariĝis distingilo de aparta poezia skolo nur post kiam grava literaturkritikisto F. Flora uzis ĝin negativsence por kondamni poezion intence malklarsignifan kaj senkontrolle analogian, precipe rilate la poeziajn verkojn de Giuseppe Ungaretti (1888-1970) kaj kelkaj aliaj poetoj (inter kiuj eblas mencii Eugenio Montale, Salvatore Quasimodo, Sandro Penna kaj kelkajn aliajn). Tamen baldaŭ la termino estis adoptita de verkistoj kaj literatur-kritikistoj sen la iama malŝata signifo, sed por reliefigi kaj epiteti la aŭtonoman poezian skolon, havantan klarajn verkocelojn, plurfoje difinitajn kaj redifinitajn. La kunlaboron de ĉi-skolaj poetoj baldaŭ akceptis la tiam prestiĝaj italaĵ literaturaj revuoj, ekzemple “Solaria” (“Suneco”), “Letteratura” (“Literaturo”), “Frontespizio” (“Frontpaĝo”), “Campo di Marte” (“Kampo de Marso”). La laste menciita revuo fakte iĝis la vera organo de hermetismo.

La fontoj kaj la apartaĵoj

El kultura kaj beletra vidpunktoj, la poetoj-hermetistoj filtradis kaj alproprigis al si multajn el la skoloj kaj pensmanieroj tuteŭropaj (ekzemple fenomenologion, ekzistencialismon, turmentoplenan katolikismon, francan simbolismon kaj moderneco-eksperimentojn). Tiaj pens-konceptoj, kune kun la intima sento-ŝiriĝo, la emo al simbolisma analogio, la poetiko de la objektoj kaj ties rilatoj atingis ĉe la hermetistoj la maksimuman gradon de esprimiva absoluteco kaj daŭran esplorklopodon trovi la sonvaloron de la unuopa vorto, disde ties teksta kunligiteco. Tio ofte kondukadis al signifomalpliigo.

Ĉe la bazoj de la hermetika poezio staris, fakte, la indentiĝo de literaturo kun vivo,

de poezio kun “homa vivkondiĉo”. Laŭ du gravaj esploristoj de tiu skolo, V. Boarini kaj P. Bonfiglioli, por la hermetistoj literaturo estis “...universo da primitivaj elementoj kaj kategorioj tre ĝeneralaj – akvo, fajro, tero, naskiĝo, morto, senkulpeco, memoro ktp, – modeloj, en kiuj la unueco homo/poezio brilegas kiel esenca realo kaj anstataŭas la vivpostulojn. Oni vivu la literaturon per adhero absoluta, per mistika senelĉerpa komunio kun la teksto”.



Giuseppe Ungaretti

La ĉefa reprezentanto

La ĉefrolanta poeto de hermetismo estis Giuseppe Ungaretti. Li naskiĝis en la jaro 1888 en Aleksandrio (Egipto). La gepatroj estis italaĵ elmigrintoj devenantaj el la Toskana regiono. Lia patro, laboristo ĉe la elfoslaboroj de la Suezka kanalo, mortis, kiam la infaneto Giuseppe estis dujara. Dum la lernojaroj en Aleksandrio Giuseppe amikiĝis kun intelektuloj kaj verkistoj, ekŝatis kaj eklegis la poeziajn verkojn de G. Leopardi, Baudelaire, Mallarmé, Nietzsche k.a. En 1912 li forlasis Aleksandriion kaj ekloĝis en Parizo, kie li plu studis, konatiĝis kun avangardaj artistoj, pentristoj kaj poetoj, inter kiuj estis ankaŭ italoj, kiuj instigis lin kunlabori kun grava itala literatura revuo “Lacerba”, en kiu aperis liaj unuaj poeziaĵoj (en 1915).

Ĉe la eksplodo de la Unua Mondmilito li soldatiĝis kaj traspertis la milit-fronton sur la Karstaj Alpoj. Ekde 1916 de tempo al tempo aperas liaj unuaj vers-kolektoj: “La sepultita haveno”, “Gajeco de ŝiprompoj”,

kaj post reverkoj kaj aldonoj en 1933 ili transformiĝas al “La gajeco” kaj “Sento de l’ tempo”. Li laboris kiel korespondanta ĵurnalisto de grava itala taggazeto, kiel gazetara respondeculo ĉe la Itala Ambasadato en Parizo, kaj poste – samrole ĉe la Ministerio pri Eksterlandaj aferoj en Romo. Ekde la jaro 1936 li ekloĝis en Brazilo, kie li ricevis la katedron pri la italaĵ lingvo kaj literaturo en la Universitato de San-Paŭlo. Dum la Brazila periodo mortis lia frato kaj lia fileto Antonietto: tiuj suferigaj forpasoj inspiris al li mirindajn versaĵojn, troveblajn ĉefe en la ciklo “La doloro” (1947). En la jaro 1942 li revenis en Italion kaj ekinstruis la italan lingvon kaj literaturon ĉe la Roma Universitato. Liaj lastaj vers-kolektoj estis “La promesita lando” (1950), “Krio kaj pejzaĝoj” (1952), “La notlibro de l’ maljunulo” (1960) kaj kelkaj aliaj. Li mortis en Milano en 1970. Lia tuta poezia verkaro aperis unuvolume en la jaro 1969 kun la titolo “Homvivo”.

La elstaraj karakterizoj de lia arta personeco kaj de lia poezia verkado estis forta vivpulsado, inspirita de liaj infanaĝaj rememoroj kaj de lia spertosoiĝo sensiva kaj viv-engaĝa. Li emis transformi sian fortan vivpulsadon en la kulturajn kaj stilajn elementojn de baroka sensualeco; li decide aplikis siajn imagi-povon kaj esprim-modelojn por poetike konstrui iujn proprajn grandajn mitojn: la haveno sepultita, la vojaĝo, la ŝiprompo, la promesita lando. Li ellaboras propran poezian lingvouzon, kie alternas la kolornuancaj esprimivoj kaj dramaj simbolaj streĉoj de la vorto firma kaj absoluta, de la paŭzo abrupta kaj silenta.

Ungaretti kaj Esperanto

Estas historie pruvite, ke G. Ungaretti estis, eĉ se ne kontraŭa, do almenaŭ pli ol indiferenta al Esperanto kaj ties originala kaj tradukita literaturo. Spite tion, multaj tradukintoj klopodis esperantigi liajn poeziaĵojn. Vers-tradukoj el Ungaretti, preparitaj fare de Luigi Minnaja, Carlo Minnaja, Gaudenzio Pisoni, Giorgio Silfer kaj Nicolino Rossi aperis en la antologio “Enlumas min senlimo – itala poezio de la dudeka jarcento” (Eld. Kooperativo de Literatura Foiro – Prilly/Svislando 1990). La aŭtoro de tiuj ĉi linioj tradukis la tutan poezian verkaron de Ungaretti, laŭ la kolekto “Homvivo” (1969). La ciklo el dek ses poemoj “La doloro” aperis en la jaro 1975 ĉe la Eldonejo La Nuova Frontiera, Pizo, Italio. La tuta cetera traduklaboro jam dum jardekoj kuŝas en manuskripta forgeso.

Invito al ‘La doloro’

Anna Maria Dall’Olio, Italio

Inter la jaroj 1936 kaj 1945 la politikaj kaj sociaj ŝanĝoj en Italio (kaj ankaŭ la personaj travivaĵoj) draste ŝanĝis la animon de Giuseppe Ungaretti (1888-1970). Unue, li spertis la renverson kaj la finon de la faŝista ŝtato, en kiu la poeto vivis kvietan kaj sekuran vivon. Due, li spertis la hororon de sistema deportado de italaj judoj kaj disidentoj en Germanion. Trie, li suferis pro la morto de la frato kaj de la naŭjara filo. Li ne plu estis “oficiala poeto”, perdis la profesoran katedron de itala beletra en Brazilo, kaj eĉ suferis la unuan kor-infarkton.

La teruraj funebroj de la Dua mondmilito sombrigis kaj ĉagrenis la spiriton de Ungaretti. Tial la poeto ĉesis dediĉi sian atenton al la metafizika dimensio kaj revenis al la tragikaj realaĵoj de ĉiutagaj aferoj. La poeto iĝas ensorbata en privatajn kaj publikajn dramojn; en sia

poemo “La doloro” li esprimis ĉian doloron, kiun li ie ajn sentis.

Eldonita en la jaro 1947 tiu poemo enhavas 16 partojn dividitajn en 6 sekciojn. “Ĉion mi perdis” (1937) enhavas 2 poeziaĵojn dediĉitajn al la forpasinta frato; “Tagon post tago” (1940-1946) entenas 17 fragmentojn dediĉitajn al la forpasinta fileto; “La tempo mutas” (1940-1945) enhavas 3 poeziaĵojn dediĉitajn al la filo; “Renkonte al pino” (1943) entenas unu poeziaĵon pri la milito; “Romo okupita” (1943-1944) enhavas 5 lirikaĵojn pri la deportado, la plej fama inter kiuj estas “Ankaŭ vi rivero mia”; “La rememoroj” (1942-1946) entenas 3 poeziaĵojn, inter kiuj estas “Ne plu ekkriu”.

Vere, “La doloro” esprimas la doloron de la poeto. Laŭ la deklaro, farita dum televida intervjuo, la poeto verkis la poemaron plorante. “La doloro” estas la libro, kiun mi amas plej multe, la libro,

kiun mi skribis dum teruraj jaroj havante oston en la gorgo. Se mi parolas pri ĝi, al mi ŝajnas, ke mi estas senpudora. Tiu doloro neniam ĉesos turmenti min” (el “Vivo de viro”).

Se vi frato mia

(ero el “Ĉion mi perdis”, 1937)

*Se vi al mi renkonte venus viva,
Kun streĉita mano,
Ankorau povus,
Ree en sinfororgeselan', mi premi,
Frato, ies manon.*

*Sed de vi, de vi plue min ĉirkaŭas
Nur revoj, ekbriloj
La fajroj jam senfajraj de l' paseo.*

*La memoro disvolvas nur imagojn
Kaj al mi mem ĉi memo
Estas vere nur
La neniiga de l' pensad' nenio.*

(tradukis N. Rossi)



Octavio Paz

Juan Jacobo Schmitter, Meksiko

Mallonga historio

En Meksiko, same kiel en la aliaj lokoj de Latinameriko, literaturo havas la radikojn en la rakontoj kaj poemoj de la indiĝenaj kulturoj. La moderna hispanlingva literaturo ĉi-landa ekevoluis, kompreneble, post la konkero de la aztekoj, majaoj kaj aliaj indiĝenoj fare de la hispanoj. Dum la kolonia periodo, Novhispanio produktis gravajn barokajn verkistojn, inter kiuj plej gravas virino Sor Juana Inés de la Cruz.

Kiam Meksiko sendependiĝis de la his-

Superrigado pri la meksika literaturo

pana imperio komence de la 19a jarcento, la artoj ne bone fartis. Nur fine de tiu jarcento eblas trovi elstarajn poetojn, kiel Amado Nervo kaj Manuel José Othón, kiuj sekvis la ĉefajn mondajn beletrajn movadojn, ekz. romantikismon kaj modernismon.

Komence de la 20-a jarcento la meksika revolucio provokis signifan disvolviĝon de noveloj, rakontoj kaj teatraĵoj dank' al verkistoj kiel Mariano Azuela. Tiel ekestis naciisma literaturo, prezentita ĉefe fare de poetoj kiel Rosario Castellanos aŭ novelistoj-rakontistoj kiel Juan Rulfo. Post 1950 la meksika literaturo diversiĝis laŭ temoj, stiloj kaj genroj.

Nobel-premiito

En 1990 la meksika literaturo ricevis la mondan rekonon – meksikano Octavio Paz (1914–1998) gajnis Nobel-premion pri literaturo. Paz estis precipe poeto. Li verkis siajn unuajn poemojn jam en frua juneco, sub influo de Antonio Machado. Dum la hispana civila milito, li apogis la respublikanojn; tamen, poste li seniluziĝis pri ĉiuj socialismaj kaj komunismaj partioj.

Li longe laboris kiel diplomato en plura landoj, inter ili en Hindio; ĝuste sur-

baze de la hindia legendo pri Hanuman naskiĝis lia longa kaj komplika poemo “El mono gramático” (“La gramatikista simio”). Inter liaj plej gravaj libroj menciendas “Libertad bajo palabra” (“Libero per parolo”), “Árbol adentro” (“Ene de l' arbo”) kaj “Piedra de sol” (“Sunŝtono”). Li verkis ankaŭ tre interesajn eseojn, kiel “La laberinto de la soledad” (“La labirinto de soleco”), kie li analizas la psikologion de la meksikanoj.

Li estis eksperimentema, malfacile klasigebla poeto. Lia poezio komence havis politikan engaĝiĝon, poste rilatis al ekzistencialismo, kaj eĉ al surrealismo. Liaj versoj estas tre lirika kaj enhavas ege belajn bildojn. Jen fragmento el lia poemo, tradukita de J. L. Gutiérrez, reliefiganta la emon fuĝi el la tempo, iom magie:

*Radik' de l' homo
Ĉi-flanke de l' muzik' kaj de la danc',
ĉi tie, en la senmoveco
ejo de la streĉita muzik',
sub la granda arbo de mia sang',
ripozas mi. Mi nudas
kaj en miaj vejnoj frapas forto,
ido de la senmovec'.
Tiu ĉi estas la ĉielo plej senmova,
kaj tiu la plej pura nudec',
vi, morta, sub la granda arbo de mia sang'.*



Projekto RoMEo: muskol-streĉe li ekflugas!

Daniele Binaghi, Italio



Jen li, finfine. Rat-Man, la famega musorela superantihero, finfine atingis Esperantujon. Jam delonge li vagadis tra la samideanaj stratetoj, kaj kelkfoje eblis duonvidi lian silueton inter la ombroj de la nokto kaj la paĝoj de *KONTAKTO*. Sed nun... nun li estas inter ni, kun siaj rakontoj, siaj aventuroj, siaj amikoj kaj siaj malamikoj: la bildstria libreto antaŭlonge anoncita forlasis la presejon kaj venis al IEJ kaj JEFO, kie eblas mendi ĝin.

Sed, ĝuste en la komenco li renkontis sian patron, Leo Ortolani, sen kiu Rat-Man ne ekzistus, kaj tiu ĉi paĝo estus blanka. Ĉio okazis en Lucca, urbo en la itala Toskanio, dum la ĉiujara komiksa foiro "Lucca Comics & Games", komence de novembro. Rat-Man estis tie: sur ĉemizoj, en vid-filmoj, en libretoj kun luksaj kovriloj, en ludkartoj, eĉ en statueta formo. Sed ankaŭ en malgranda stando, duonkaŝita inter larĝaj kaj potencaj entreprenoj: la stando de la italaj esperantistoj. Rat-Man estis tie, sub verda titolo, en dekoj da paĝoj plenplenaj je Esperantaj vortoj.

La patro, rigardante la rat-filon kaj liajn novajn geamikojn, estis tre feliĉa, ĉar Rat-Man nun kapablas paroli novan lingvon, kaj dank' al tio homoj el foraj anguloj de la mondo baldaŭ konatiĝos kun li, kun liaj historioj, kun liaj aventuroj... La patro ridetis, kaj ne plu tro gravis por li la luksaj kovriloj, la ludkartoj, eĉ la vid-filmoj. Rat-Man nun havas tute novan universon por flugi. La patro rigardis al la filo, kaj la filo rigardis al la patro. Silenta interkonekto. Poste ili ekflugis muskol-streĉe!

Por provi retrovi ilin, serĉu en la paĝoj de la projekto RoMEo: <http://www.pecorElettriche.it/Esperanto/RoMEo> aŭ rekte kontaktu IEJ aŭ JEFO).

© Leo Ortolani, 1998-2008
 Bildstrioj tradukitaj de projekto RoMEo, © 2007. Trad. en Esperanton de Daniele Binaghi

“Lolita” de V. Nabokov – skandala kaj aktuala

Rubén Feldman-González,
 Meksiko/Usono

La fama libro de Vladimir Nabokov “Lolita” estas sufiĉe populara – ĝi iĝis bazo por eĉ kelkaj filmoj. Tamen neniu filmo sufiĉos por honori la literaturan nivelon de tiu verko.

Skandala verko

Facile direblas, ke Vladimir Nabokov estas la dua kaj nuntempa Ŝekspiro de la angla lingvo. Tamen li estas naskita en Rusio, lerte verkis ruse kaj estis granda specialisto pri la rusa literaturo. La plej konata inter multaj liaj libroj estas “Lolita”.

Kiam mi legis ĝin unuafoje, mi komprenis, ke nepre bezonatas dua legado kun angla vortaro. Por la tria legado mi devis aĉeti pli ampleksan vortaron, ĉar multaj anglaj vortoj uzataj de Nabokov simple ne troveblis en mia mezgranda vortaro. Necesas klarigi, ke mi dum sufiĉe longa tempo laboris en Usono, do leksiko de la angla lingvo neniam estis por mi vera problemo. Tamen la angla de Nabokov estas speciala afero: riĉega, poema, humura, satira, ironia, ŝoka... La tria legado perfektigis mian anglan. La kvara legado de ĉi tiu eksteror-

dinara libro finfine ebligis al mi atingi la intelektan ekstazon.

Pri kio do temas la verko? Ĝi rakontas pri mezaĝa franca intelektulo Humbert, kiu en Usono enamiĝas al ege malĉastigita 12-jara junulino. La malĉasteco de Lolita antaŭ la rilato kun Humbert (kaj dum ĝi) estas delikate vualita de la izola ĉiutaga vivo en malĉasta socio.

Ankaŭ nun aktuala

La libro malkovras kelkajn el la intimaj problemoj de la socio, suferanta pro konstantaj militoj, eksedziĝoj, memcentriĝoj, senmoraleco ktp. La aŭtoro mem tiel difinis la

enhavon de la libro en la prologo: “Arta verko kaj etika denunco pri la malĉasteco de infaninoj ene de danĝeraj socialaj tendencoj”.

Tiel estis en 1955. En 2008 la problemoj fariĝis multe pli gravaj. Laŭ kelkaj pritaksoj en la nuntempa pornografio laboras 20% de analfabetaj kaj malriĉaj junulinoj aĝaj inter 15 kaj 20. En la vendado de neleĝaj drogoj la junula partopreno estas eĉ pli grava launombre.

“Lolita” devus puŝi nin ĉiujn agi pli vigle por plibonigi la novajn homajn generaciojn kaj fari la mondon pli viv-kapabla.

Misprezentoj kaj prisilentoj

(Reago al "Mitoj pri naturprotektado", *KONTAKTO* 2007:5)

Kun bedaŭro mi legis la artikolon "Mitoj pri naturprotektado" de Aleksandro Galkin en *KONTAKTO* 2007:5. Mi bedaŭris ne pro lia opinio (ja ĉiu rajtas havi sian propran opinion), sed pro la misprezentoj de scienco kaj realo, kiujn oni trovas en lia artikolo.

Ekzemple, Aleksandro mencias, ke la kontribuo de karbondioksido al la tutmonda varmiĝo estas "nur" 9-20%. Jes ja, sed la koncentritecon de la sola pli potenca forceja gaso – nome akvovaporo (ĝi "respondecas" pri 36-70% de la efiko) – la homaro ne ŝanĝas, ĝi restas la sama dum la lastaj jarcentoj. La gravecon de karbondioksido por la tutmonda varmiĝo oni klarigas per tio, ke ĝi estas la ĉefa forceja gaso, kies kvanton rekte influas la homa agado (ĉefe per la forbruligo de fueloj kaj detruo de arbaroj). Ĝi ja ne estas la sola "kulpulo" pri la tutmonda varmiĝo, kiel emfazas Aleksandro, sed ĝia ellaso fare de homaro ja estas la ĉefa kialo de la varmiĝo, kion la vortumo de la artikolo lerte maskas.

Aleksandro ankaŭ konfuzas elmilojn (‰) kun partoj per miliono (ppm), kiam li parolas pri koncentriteco de la forcejaj gasoj. La kvanto de karbondioksido en la hodiaŭa atmosfero estas 380 ppm, ne ‰.

Fine sekvas multaj misprezentoj pri la Kiota Protokolo. Unue, ĝin preparis ne UN "kunlabore kun kelkaj naturprotektaj organizoj" (tio estus tro bela vero), sed ĝi estis dum kvin jaroj negociata fare de pli-

malpli ĉiuj landoj de la mondo en diplomataj debatoj. Aleksandro erare diras, ke ĉiuj ratifikintaj landoj devas redukti siajn elĵetojn de karbondioksido je 10%. En la realo laŭ la protokolo la evoluintaj landoj (ili estas listigitaj en la Aldonaĵo B de la protokolo) devus sume redukti siajn elĵetojn je 5,2% kompare kun la sumaj elĵetoj de tiuj landoj en 1990. Tamen apartaj landoj havas diversajn celojn koncerne la reduktadon, ekzemple Usono – devas redukti la elĵetojn je 7%, la tuta Eŭropa Unio – je 8%, Rusio – je 0%, kaj Aŭstralio eĉ rajtas pligrandigi ilin je 8%.

Kiam Aleksandro skribas pri la elĵetoj de Ĉinio kaj Barato, li "forĝegas" menci, ke la popersonaj elĵetoj de tiuj du landoj estas respektive 7 kaj 18 fojojn malpli grandaj ol la popersonaj elĵetoj en Usono. Kiuj do respondecas pli – ĉu ĉinoj aŭ usonanoj? Aleksandro ne mencias ankaŭ, ke la landoj kiel Britio kaj Usono ellasadis karbondioksidon dum pli ol jarcento (Britio komencis la unua antaŭ 150 jaroj), sed en Ĉinio kaj Barato tio okazadis nur dum la lastaj jardekoj. Mi malkonsentas ankaŭ pri tio, ke la penoj de ceteraj landoj (krom Usono, Aŭstralio, Ĉinio kaj Barato) "apenaŭ havos deziratan efikon". Estas klare, ke la Kiota Protokolo estas enorme grava kiel "testa periodo" por prepari grundon por pli ambicia kaj ampleksa traktato, kiun oni esperas havi finpreta dum la UN-a konferenco en decembro 2009 en Kopenhago.

Sekvas misprezentoj kaj pri "monpunoj", kiujn devos pagi la landoj, malsukcesintaj pri realigo de la protokolo, kaj pri la negativaj ekonomiaj efikoj, kiujn kaŭzas la reduktado de la elĵetoj (la plejparton de la reduktorimedoj eblas atingi sen aldonaj kostoj, kaj certa granda parto de tiuj rimedoj alportos eĉ ekonomiajn avantaĝojn). Krome, la tutmonda varmiĝo estas pli morala problemo, ol la ekonomia. Kiel oni do povas argumenti per monaj perdoj kompare kun la perdoj de homaj vivoj, loĝlokoj, biologiaj specioj kaj kondiĉoj de la surplaneda vivo?

Fine, la manko de unuvoĉa konsento rilate la kialojn de la tutmonda varmiĝo estas simple malvero. Lastatempaj publikaĵoj en la revuo "Science" kaj ankaŭ la raportoj de IPCC (Interregistara Spertularo pri Klimat-ŝanĝiĝo) klare parolas pri tio, ke ĝuste la homa agado kaŭzas la varmiĝon. Aleksandro misprezantas ankaŭ la influon de politiko al la scienca procezo kaj opinio, dum la vera fakto estas la mala: ĝuste scienco informas politikistojn pri la kialoj kaj sendas siajn rekomendojn pri la necesa agado.

Legantoj de *KONTAKTO* povas starigi al mi pliajn demandojn kaj dubojn pere de la retpoŝto. Kiel diplomigonta magistra studento pri naturmediaj studoj kaj daŭripovo-scienco, kiu nun okupiĝas pri verkado de tezo pri sociaj reagoj al klimatsanĝiĝo, mi esperas respondi ilin dece.

Oleg Izjumenko, Rusio/Svedio
<oleg@ikso.net>

Unua libro verkita en Esperanto en Brazilo 70-jariĝas

Fabiano Henrique, Brazilo

La unua libro originale verkita en Esperanto en Brazilo fariĝis 70-jara. Temas pri "Veterano", kies aŭtoro estas Iŝmael Gomes Braga. La libro pritraktas la esperantistan travivaĵon de unu el la plej elstaraj aktivuloj de la esperanto-movado ne nur en Brazilo, sed ankaŭ en la tuta mondo, dum la unua duono de la XX jarcento.

La kialo de apero de tiu verko estis demando, disdonita okaze de la Brazilo Kongreso de Esperanto (en la jaro 1937). Ĝi temis pri la spertoj de kelkaj gravaj samideanoj tiam taksataj maturaĝaj. Kvankam Iŝmael Gomes Braga ne ŝatis esti konsiderata kiel maljunulo, li konsentis



respondi la demandojn. En la antaŭparolo li eĉ diras: "Veterano mi?!... Eksigita soldato aŭ emerita oficiro?!... Sed mi estas juna kaj brava batalanto!" Lia nura postulo estis, ke oni rigardu lin kiel "junulon de pli da tempo ol la aliaj".

Poste la plenigita demando ebligis la eldonon de la verko, kiu ja estas tre valora historia dokumento, plena je gravaj faktoj kaj konsiloj por la venontaj genera-

cioj. Ĝia unua eldono, preparita de Eldonejo Gazeto de Ameriko fine de 1937, rapide elĉerpiĝis. Kelke da favoraj recenzoj aperis en la esperantistaj periodaĵoj. Tiu tute ne antaŭvidita situacio mirigis la aŭtoron kaj atestis la sukceson de la libro.

La teksto estis skribita en stilo simpla, flua kaj speciale gajhumora. Plenigas la libron kolekto da artikoloj el pluraj epokoj, ĉiuj riĉaj je saĝeco kaj sobreco. Tiuj kvalitoj – kaj ankaŭ la aliaj trovotaj de la legantoj – faras el "Veterano" verkon nepre legindan por ĉiu scivolema esperantisto.

<Rete>

Vizitu la paĝaron de Kultura Kooperativo de Esperantistoj, kie eblas mendi la libron: www.kke.org.br.



“Literatura seminario”, de Martin Weichert

FARIĜU KONSCIA SUBTENANTO DE TEJO!

fariĝu patrono de TEJO

Pagante trioblon de vialanda MJ(-T)-kotizo vi ne nur subtenas la esperantistan junularon; de TEJO vi ankaŭ ricevas:

- revuon *KONTAKTO*
- bultenon TEJO Tutmonde (oficiala organo de TEJO)
- akcepton dum la ĉiujara Universala Kongreso
- aliajn laŭokazajn servojn kaj publikigaĵojn

JUNA AMIKO – internacia e-revuo de ILEI por lernejoj kaj komencantoj

- aĝas 30 jarojn kaj aperas 3-foje jare (aprilo, septembro, decembro) sur po 52 plurkoloraj paĝoj kun plenkoloraj kovriloj;
- havas kunlaborantojn el ĉiuj kvin kontinentoj;
- rabato ĝis 50%!

Karakterizas ĝin:

modela stilo kaj facila lingvaĵo (1500 vortradikoj sen glosoj), enhavo tre varia: rakontoj, fabeloj, raportoj, informoj, interesaĵoj, enigmoj, kvizoj, versaĵoj, ludoj, kantoj, humuro, lingvaj konsiloj, interkulturo, kuriozaĵoj, voĉo de legantoj k.a. kun multaj ilustraĵoj.

JUNA AMIKO estas fonto de taŭgaj legaĵoj por komencantoj, fidinda helpilo por E-kursgvidantoj.

Vizitu nian TTT-ejon: <www.junaamiko.inf.hu> aŭ en <www.lernu.net>!

Ĉu vi serĉas korespondamikon?

Sendu al *Koresponda Servo Mondskala* jenajn detalojn: nomo, adreso, sekso, aĝo, profesio, geedza stato, kiom da korespondantoj vi deziras, en kiuj landoj kaj pri kiuj temoj. Kunsendu 2 internaciajn respondkuponojn, aŭ, se ili ne estas aĉeteblaj en via lando, neuzitan poŝtmarkon. KSM pludonos viajn informojn al alia(j) korespondemulo(j), kiu(j) konformas al viaj deziroj. Vi ricevos rektan respondon. KSM estas servo de UEA.

Skribu: **Koresponda Servo Mondskala, B.P. 6, FR-55000 Longeville-en-Barrois, Francio**

Kotiztabelo de UEA por 2008

Lando/valuto	MG	MJ(-T)	MA(-T)	SA	Kto	SZ
Aŭstralio/dolaro	15	38	96	58	35	192
Aŭstrio/eŭro	9	23	58	37	22	116
Belgio/eŭro	9	23	58	37	22	116
Brazilo/eŭro	5	12	29	17	10	58
Britio/pundo	6	16	39	25	15	78
Ĉeĥio/krono	200	490	1220	770	460	2440
Danio/krono	70	170	430	275	165	860
Estonio/krono	85	210	515	325	195	1030
Finnlando/eŭro	9	23	58	37	22	116
Francio/eŭro	9	23	58	37	22	116
Germanio/eŭro	9	23	58	37	22	116
Greklando/eŭro	9	23	58	37	22	116
Hispanio/eŭro	9	23	58	37	22	116
Hungario/forinto	1700	4300	10750	6850	4100	21500
Irlando/eŭro	9	23	58	37	22	116
Islando/eŭro	9	23	58	35	20	114
Israelo/eŭro	7	18	45	27	16	90
Italio/eŭro	9	23	58	37	22	116
Japanio/eno	1500	3700	9200	5500	3300	18400
Kanado/dolaro	14	34	86	52	31	172
Latvio/lato	4	9	23	15	946	
Litovio/lido	18	45	110	70	42	220
Nederlando/eŭro	9	23	58	37	22	116
Norvegio/krono	75	190	470	280	170	940
Nov-Zelando/dol.	18	45	113	68	41	226
Pollando/zloto	22	55	140	90	54	280
Portugalio/eŭro	9	23	58	37	22	116
Rusio/eŭro	5	12	29	17	10	58
Slovakio/krono	230	570	1425	910	550	2850
Slovenio/eŭro	6	16	40	25	15	80
Svedio/krono	85	215	540	345	205	1080
Svislando/franko	15	38	95	57	34	190
Usono/dolaro	12	29	72	43	26	144
TARIFO A/eŭro	6	16	40	24	14	80
TARIFO B/eŭro	5	12	29	17	10	58

ALIAJ LANDOJ: Luksemburgio laŭ Belgio; San-Marino laŭ Italio; Kipro kaj Slovenio laŭ Malto; Liĥtenŝtejno laŭ Svislando; Bulgario, Latvio, Litovio kaj Rumanio laŭ Estonio.

TARIFO A: Honkongo, Korea Respubliko, Singapuro, Sud-Afriko, Tajvano.

TARIFO B: Ĉiuj ceteraj landoj ne jam menciitaj.

Mallongigoj:

MG – Membro kun Gvidlibro

MJ – Membro kun Jarlibro

MJ-T – MJ malpli ol 30-jara (individua membro de TEJO; ricevas ankaŭ la revuon

KONTAKTO kaj la bultenon TEJO Tutmonde)

MA – Membro-Abonanto (ricevas la Jarlibron kaj la revuon Esperanto)

MA-T – MA malpli ol 30-jara (individua membro de TEJO; ricevas ankaŭ la revuon

KONTAKTO kaj la bultenon TEJO Tutmonde)

SA – Simpla abono de la revuo Esperanto sen membreco

Kto – Simpla abono de la revuo *KONTAKTO*

SZ – Societo Zamenhof (subtena kotizo aldone al membrokotizo)

PT – Patrono de TEJO: 3-oblo de MJ (ricevas *KONTAKTO* kaj TEJO Tutmonde)

DM – Dumviva Membro: 25-oblo de MA (ricevas dumvive la samon kiel MA)

DMJ – Dumviva Membro kun Jarlibro: 25-oble de MJ (ricevas dumvive la samon kiel MJ)

Kiel individuaj membroj de TEJO (MJ-T aŭ MA-T) por 2008 estos registritaj tiuj individuaj membroj de UEA, kiuj estos malpli ol 30-jaraj la 1-an de januaro 2008 (t. e. kiuj naskiĝis en 1978 aŭ poste). Ankaŭ Dumvivaj Membroj samtempe membras en TEJO, dum ili estas malpli ol 30-jaraj.

Eblas aboni ankaŭ la revuon TEJO Tutmonde sen membreco en TEJO. La abonprezo estas duono de la MJ-kotizo por la koncerna lando.

Oni povas pagi pere de la perantoj de UEA, aŭ rekte al UEA per ĝia banka aŭ poŝta konto, per ĉeko aŭ poŝtmandato, aŭ per kreditkarto.

Astrid Lindgren kaj la solaj knaboj



VARVARA-2002. Astrid Lindgren.



Leif Nordenstorm, Svedio

Ĉu vi konas Astrid Lindgren? Ŝi vivis inter 1907 kaj 2002, kaj do naskiĝis antaŭ cent jaroj en la urbo Vimmerby en Smolando (Svedio). Kiam ŝi estis infano, ŝi ŝatis legi. En 1945 ŝi verkis rakonton pri Pipi Ŝtrumpolonga por sia filino, kiam tiu iĝis 10-jara. Nun infanoj en la tuta mondo konas la librojn de Astrid Lindgren. Oni tradukis ŝiajn librojn al okdek ok lingvoj, ankaŭ al Esperanto.

Iu rimarkis, ke en multaj ŝiaj libroj ekzistas solaj knaboj. Mio el "Mio, mia filo" loĝas ĉe Sinjorino Edla kaj Sinjoro Sixten. Ili diras, ke lia patrino mortis kaj ke lia patro estas malriĉa kaj malbona homo. Mio tamen trovas sian patron en la Lando Fora, kiun la patro estras. Tie la knabo devas militi kontraŭ mal-bon-ulo Ĥato.

La fratoj Karlo kaj Jonatano en "La fratoj Leonkoro" havas patrinon, sed ilia patro estas mar-isto. Li preskaŭ neniam estas

hejme. Karlo estas tre mal-sana, kaj Jonatano mortas dum **savo** de sia frat-eto de **fajro** en ilia domo. Poste Karlo mortas pro malsano. En la lando Nangijala Karlo renkontas sian fraton, sed montriĝas, ke ankaŭ en tiu lando estas ne nur bono, sed ankaŭ malbono. En la libro "Rasmus iradas", kiu ne ekzistas en la Esperanta traduko, la juna knabo Rasmus loĝas en infanejo, sed li ne volas resti tie.

Kial Astrid Lindgren ofte verkis pri solaj knaboj? La klar-igo povas esti la jena. Kiam ŝi havis dek ok jarojn, ŝi **graved**-iĝis. En la mal-granda urbo Vimmerby multaj homoj opiniis, ke estas tre mal-bona afero, ke ne-edzino iĝas graveda kaj eĉ ne volas diri, kiu estas la patro de la infano. Astrid ek-loĝis en Stokholmo. Ŝi tamen iris en Danion por naski. Tie ŝi lasis sian filon Lars ĉe dana familio por tri jaroj. Poste ŝi povis mem zorgi pri sia filo. Poste ŝi edz-in-iĝis kaj naskis filinon. Nur antaŭ kelkaj jaroj oni ek-sciis, ke la patro de la filo estis konata redakt-isto de loka gazeto. Li estis edzo, kiu volis eks-edz-iĝi. Laŭ la tiamaj svedaj reguloj, la redaktisto devus pagi multan monon, se oni eksciis, ke li **graved**-iĝis alian virinon. Astrid ne volis tion, kaj tial ŝi

for-sendis sian filon por tri jaroj.

Astrid Lindgren foje diris: "Se tio ne okazus, mi ne fariĝus verk-ist-ino". Tute certe ŝi ne verkus multajn librojn pri solaj knaboj, se tio ĉi ne okazus!

fajro – varmega ruĝa afero, kiu aperas, kiam io brulas
graveda – kiu havas infanon en si, baldaŭ naskos infanon

koro – la ĉefa ero, parto de la homo, sid-ejo de la sentoj, de la amo

leono – forta kat-simila besto en Afriko

savi (savo) – fari tiel, ke iu ne mortu en malbona kaj malfacila situacio

ŝtrumpo – vestaĵo por piedo

Bildo (maldekstre) de Varvara.



"Mio, mia filo" (traduko en Esperanton de Leif Nordenstorm)



La domo de Astrid Lindgren



La muzeo de Astrid Lindgren